

Popola universitato- Pluezek renkontiĝo

Ana Songanta (el Koreio)

Antaŭ unu jaro de la 17-a Internacia Renkontiĝo-Pluezek, en mia kapo Pluezek estis sufiĉe imagebla loko. Kiam mi vojaĝis en Francio, eĉ en Slovakio, multaj menciis pri Pluezek renkontiĝo. Marborda vilaĝo, familia etoso, bongustaj krespoj allogis min iri al Pluezek.

Kiam mi atingis la enirejon de la renkontiĝo helpe de Suzanne Emorine kaj de ŝia edzo Michel, kiuj gastis min kaj veturigis fore de Clermont-Ferrand, mi jam intuciigis, kial oni diras, ke Pluezek renkontiĝo estas familia. Ĉe la enirejo homamaso babiladis ĉirkaŭ tablo. Mi ne povis rimarki, kiu estas prezidanto aux organizantoj. Ĉar ĉiuj manoj estis okupitaj por senŝeligi mil da fazeoloj, ankaŭ la buŝoj por babiladi. Kompreneble, ankaŭ mi spontanee intervenis en tiun laboron.

"Saluton! Ĉu vi estas Ana, kiu venis de Koreio?"

"Ĉu en Koreio vintre multe neĝas?"

"Ĉi tie negxo estas rara."

"Tiom da fazeoloj estos kuiritaj por nia vespermanĝo.

Senrilate al aĝo, sekso, devena lando kaj posteno, ni tuj iĝis familianoj en Pluezek renkontiĝo.



Ĉiumatene la vilaĝa lernejo, nomata <Marcel Lefevre> malfermiĝis kaj 109 partoprenantoj disiĝis en diversspecajn kursojn, kiuj estis gviditaj de Elisabeth LE DRU (el Francio), Jean-Luc KRISTOS (el Francio), Michel DECHY (el Francio), Dimitri CIBULEVSKI (el Ukrainio), Georgo HANDLZLIK (el Pollando), Alain DELMOTTE (el Belgio) kaj mi, Ana Songanta (el Koreio). Post trihora kurso, ni denove amasiĝis por komuna tagmanĝo en granda salono. Kuirita teamo cxiam donis al ni

specialan manĝaĵon kun varma rideto. Posttagmeze ĉiuj explore promenadis vizitindajn lokojn en Bretonio helpe de Jeanne kaj de Maryvonne. Estis ege impresaj pejzaĝoj, plaĝo <Bonaparte>, la pinto de Bifot, Pors Lazo <La ostroj>, la kapelo <Kermaria>, la muelilo <Kraka> kaj tiel plu.





Laŭvole ni partoprenis en atelieroj, kies specoj estis informatiko, kantoj, jogo, keltaj desegnaĵoj, teatro, sunhorloĝo & astrolabo kaj tiel plu. Plezura lernado anstataŭis ripozon kaj sieston. Plie, vespere de la 8a, pompaj programeroj atendis nin. Kanta spektaklo <Karmen> estis valora pro tio, ke lertaj kaj diversaĝaj amatoroj pasie spektaklis kun bela harmonio. Bretona danco, en kiu oni vigle kaj rondmoviĝante dancas kun ligitaj fingroj, spontanee instruis min kiel bretone enritmiĝi. Sincere, dum la dancado mi multe ridis rigardante zigzagajn paŝojn kaj kompreneble multe ŝvitis. Du teatroj, kiujn atelieranoj faris kaj Georgo sole aktoris, tute emociis min. Konfese, mi iomete timis, ĉu inter tiaj amuzaj aranĝoj, mia prelego povus vekti partoprenantojn. Ĉar fine de la tago, kun ĝissata stomako oni povus facile endormiĝi.

Feliĉe, inteligentaj Pluezekanoj forpelis mian zorgon kaj ili atente aŭskultis min prelegi, kiu temis pri korea speciala edukadsistemo LLG (Libera Lernejo por Geknaboj) kaj Esperanto.

Krom la prelego, mi kunportis ses temojn por mia kurso en Pluezek, kies titoloj estis Kamparen, Norda Koreio kiel korea familio, Agrikulturado de kamparenanoj, mia kampo : Esperanto & LLG, Korea tradicia medicino per skajpa kontakto kaj Koreaj tipaj manĝaĵoj.





Lasta kurso estis farita por gustumi popolan manĝaĵon. En Koreio, kiam pluvos, oni aŭtomate sopiras manĝi "Buchimge". Ni partoprenantoj kune kuiris gxin. Unu grupo purigis legomojn kaj pecigis ilin. Alia grupo en la kuirejo jam preparis patojn metinte oleon. Onidire, malsato estas bona kuiristo. Ni ĉiuj emocie kuiris per harmonia koro. Dum la kuirado, miaj kursanoj svarmis en la kuirejo. Unu plado, ĵus kuirita, tuj alkonportigis por gustumi. Ne atendinte oni kriis "Bongusta!" Bonŝance, la tempo estas ĵus antaŭ tagmanĝo. Alia krio estis "korea krespo!" Ja, La popola manĝaĵo tre similas al krespo de Bretonio. Tia etoso ebligis nin fariĝi tutmonda familio.



Dum mia matena kurso, mi ĵetis demandojn al ĉiuj jene :

-Louis Vuitton loĝis en la Ĵurasa akvomuelilo Chabouilla. Kiam 17jarĝas, post la morto de sia patrino, la juna Louis forlasis la regionon (piede dum 400 km) por ion ajn esperi bonŝancon en Parizo. Tio estis grava translokiĝo en lia vivo. Ĉu vi havas tian translokiĝon signifoplenan dum via vivo?

-Dum urba vivo, miaj familianoj estis nur tiuj, kiuj loĝas kun mi. Neniam mi dubis pri tiu ideo. Post kampareniro, mia barilo pri familio rompiĝis. Plie, multaj sud-koreanoj havas lasintajn familianojn en norda Koreio. Kiel vi opinias pri familio kaj vilagxano? Kiun novaĵon vi gardas pri norda Koreio?

-Ĉiuj raŭpoj grimpas supren kaj supren. Raŭpoj mem faras grandan kolonon. Strange, unu el amaso da raŭpoj kuraĝe elvojiĝas de la kolono. Ĝi havas songon. Ĝi dubas pripensante, ĉu la vivo estas nur supreniri? Do, kio estas via songo?

-Mia kampo estas Esperanto. Ĝenerale kampo donas al ni rikoltaĵojn, se ni semis ion. Kion donis al vi Esperanto?

Dum tia serioza parolado, iu partoprenanto menciis, ke Esperantujo estas popola universitato. Ene de ĝi oni povas lerni diverslandajn kulturojn. Ĝi estas vivanta kaj verva lernado. Plie, parolante Esperanton unu kun la aliaj ni sentas nin nature komprenitaj kaj komprenitaj. Ĉar ni jam bone konas, ke ni originas de aliaj nacioj, kaj ni ĝuas tiajn diversecojn, kiuj alvokas sicvolemojn homajn. Se tutmondanoj povus vivi en paco, se oni povus lerni kaj ĝui tutmondan kulturon senlime, se en ĉiu renkontiĝo oni povus danci, kanti kaj teatri man-en-mane en sia tuta vivo, la spaco fariĝus vere tutmonda popola universitato. Kie ni povus lernis tutmondan kulturon kun gaja etoso krom Esperantujo?

Dum unu semajno en Pluezek, kvankam mi kursis kiel honora gasto, mi devas konfesi, ke mi mem lernis multon de vi, pluezekanoj. Mi gajnis multajn trezorojn en mia koro. Pluezek-renkontiĝo renovigis min kaj malhelpis min fariĝi banala. Tial mi tute aprovas, ke ĝi estas popola universitato en Esperantujo.

Karaj, ni ĝuus Esperanton kiel dumvivan lernadon kaj ni kreskiĝu kiel pacemuloj.

Ni, esperantistoj disvastigu pacon.

Ni kolorigu tutmondon je feliĉo.

Kaj venontajn jarojn ni denove renkontiĝu en popola universitato, Pluezek-renkontiĝo.